

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Novembro 1953

41-a jaro N-ro 11

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

D-ro
F. Szilágyi:

INTERVJUO

KUN

**TEO
JUNG**



Regardante al la pasintaj jardekoj, oni povas miri, kiel persistaj estas la radikoj de nia movado. Kiom okazis post la unua mondmilito: eĉ eroj de tiu multo de tumulto ŝajnis esti sufiĉaj por ekzekuti la relative junan esperanto-movadon, kies karakterizaĵo estas en la memorindaj vortoj de Zamenhof, ke en ĝiaj kunvenoj ne renkontiĝas "regnestroj nek ministroj por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj..."; sed la interna forto de la konkreta bezono vivigas sian lingvon kaj ĝian popolon tra kaj trans barbaraj militoj, periodoj de perforto, senindulgo kaj renverso, pri kiuj tiom da ekzemploj amasiĝas en la ĵusa historia ĉapitro.

Persisto natura trasavis nian movadon kaj parolante pri la persisto de nia movado ni konscias, ke estas homoj, kiuj movas, puŝas, gardas kaj akcelas la movadon, spitas gigantajn obstaklojn, laboras deĵoras, servas kaj "pacience eltenas".

Pripensu, ke HEROLDO DE ESPERANTO estis fondata (sub la nomo "Esperanto Triumfonta") en la jaro 1920, kaj pensu pri tio, kiom da penoj, oferoj, perdoj, kiom da vario de sukcesoj kaj vandalaj batoj signifas tiuj ĉi 33 jaroj. Dum tiu ĉi longa kaj penoplena periodo la sama persono gvidis la entreprenon kaj identigis sian vivon kun ĝi: Teo Jung, kiu amas Esperanton kaj kies pasia esperantisteco savis „Heroldo“-n en multaj malfacilaj situacioj, ĉu ekonomiaj, ĉu internaci-politikaj. Teo Jung estas ne nur ĵurnalisto, sed grava verkisto. Li verkis i.a. originalan romanon "Landoj de Fantazio". En 1926 li gajnis premion de la Floraj Ludoj per sia "Alta Kanto de la Amo". Pasintjare, kiam li atingis sian 60-an jaron, UEA elektis lin honora membro por esprimi per tio la altetakson de tiu senlaca kaj sinofera laboro, kiun Jung produktis dum sia ĉ. 40-jara funk-

(daŭrigo sur p. 98)

Lektor
Valdemar Langlet:

**NYCKELN
TILL
VÄRLDEN**



Vi nedlægger mycken möda på att lära oss främmande språk — naturligt nog då vi tillhör en liten nation med livliga utländska förbindelser som ökas med varje år. Vi kan inte begära att av främlingar bli förstärkta på vårt eget tungomål; vill vi ha med dem att göra måste vi lära oss deras i den utsträckning det för våra syften är nödigt och nyttigt. Därvid räcker det inte med ett, så länge inget av dem lyckats erövra rangen av allmänt erkänt "världsspråk" och om man någonsin kommer därefter vet ännu ingen.

I gamla, länge sedan förgångna tider hade hela vår världsdelen lärda och bildade klasser fördelen av latinnet som gemensamt uttrycksmedel både i tal och skrift, men fasthållandet vid dess strängt klassiska form, mer eller mindre gjorde det småningom otjänligt för en nyare tid. Frammot mitten av 1700-talet började franskan intaga ungefär samma ställning och behöll den långt in på följande århundrade. Men genom den snabbt tillväxande viljan hos ett stort antal tidigare undertryckta folk att "hävda" sin egen nationella särart blev detta i högre kretsar från barndomen inlärd och livet igenom ofta brukade språk småningom undanskjutet till ett mera begränsat område, diplomatin, där det ända intill våra dagar väsentligen behållit sin tidigare rangplats.

De världshistoriska sammanhangen har däremot i hög grad främjat det engelska språkets ökade utbredning. En fantastisk tillväxande industri, handel och sjöfart och ett i samband därmed vunnet, oerhört omfattande kolonialvälde förde britternas tungomål till högsätet. Det kom efterhand att inta en förhärskande plats ej blott på "de sju haven" och i världens alla hamnar utan även på hela den nordamerikanska kontinenten. Och sedan Förenta staterna i de senaste årtiondena övertagit rollen som mäktigaste faktor i världspolitiken har den tanken alltmera gjort sig gällande att engelskan har goda utsikter att bli det all-

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Novembro

1953

Rompu la glacien!

Kun certa ĝojo kaj entuziasmo la homoj loĝantaj ĉe lagoj kaj maroj salutas la alvenon de la unua ŝipo de la jaro. Post la longa vintra izoligo ili ja denove ricevas kontakton kun la ekstera mondo. La glacio kelkfoje

mänt kända och erkända världsspråket. Men åtskilliga fakta talar häremot. Främst väl den allt starkare framträdande nationalismen i alla jordens länder och tillvaron av flera någorlunda jämbördiga medtävlare, föga benägna att ge efter i kampen om främsta plats i solen. Därtill kommer att engelskan både genom sitt uttal och sitt ålderdomliga stavsätt erbjuder vida större svårighet att rätt inläras än vad sjömäns och emigranternas snabbt vunna förmåga att nödortfigt "snacka" engelska tycks ge vid handen.

Ur dessa synpunkter borde ett på grundval av den stora mängden för alla kulturspråk mer eller mindre gemensamma ord och termer och med tillämpning av minsta möjliga antal grammatiska regler och former nyskapat internationellt språk ha bättre utsikter att uppnå den efterträdade platsen som lämpligt och bekvämt organ för mellanfolkliga förbindelser i tal och skrift.

Av de talrika försök som i den vägen gjorts synes blott ett enda, Esperanto, vara i stort sett väl lyckat. Dess inlärande kräver blott en relativt mycket obetydlig möda även av den i främmande språk alldeles okunnige, och dess användbarhet vid möten med deltagare från snart sagt alla Europas länder har i mer än ett halvsekel visat sig hålla provet; till den långa raden av sådana stora årliga möten kom innevarande år ett som förlagts till det jugoslaviska Zagreb.

Vid de numera så snabbt ökade tillfällena till billiga utlandsresor synes det helt naturligt att man i allt vidare kretsar lär sig läsa och tala esperantospråket och på den vägen med ringa offer av tid och möda anskaffar en liten billig patentnyckel, som kan öppna en hel rad dörrar i främmande land. Ju flera som gör det, dess mera växer den därvid uppnådda fördelen. Att resa utomlands eller hemma stå resande utlänningar till tjänst blir då icke längre ett privilegium för rikt folk och högt bildade personer. Både ferietid och nödiga medel stå numera till förfogande för många som förr aldrig kunde drömma att en gång få lägenhet till att se sig om ute i världen, och de hinder som bristande språkkunskaper lägger i vägen är redan nu i ej ringa mån undanröjda.

Att Esperanto redan fullgör en stor uppgift i de internationella förbindelsernas tjänst framgår med all önskvärd tydlighet av de världsmöten som årligen äger rum med deltagande av representanter för många olika nationer — ej minst kongressen i Zagreb, till vilken hade anmält sig 1 800 personer, däribland 150 från vårt eget land. De undgick därvid all den möda, kostnad, tidsförlust och andra besvär, som vid andra kongresser i våra dagar alltid förenas med användningen av minst fyra med varandra om herraväldet kämpande "världsspråk": franska, engelska, spanska och ryska. Att icke tala om det tyska, som för en tid framåt förlorat sin plats i solen, och de asiatiska, som väl i framtiden också kommer att göra anspråk på en sådan!

(Ur Östgöten)

estas tiom dika kaj fortika, ke ne eblas al ordinara ŝipo rompi per propra forto la vojon al iu haveno. Kiel oni agas tiam? Jes, oni petas helpon de glacirompanto.

Kiam mi skribas ĉi tion, mi fakte sentas emon meti signon de egaleco inter la laboro de la glacirompantoj kaj la informantoj pri esperanto...! Ankaŭ la propa-grandistoj pri nia lingvo devas rompi glacien, nome la kontraŭstaron ĉe la homoj, kiuj ne emas kompreni kaj taksi la signifon kaj gravecon de nia lingvo. Nia glacirompa laboro ne ĉiam glitas rapide antaŭen, tial ni iun fojon emas fari paŭzeton por ripozi, sed ni ne faru tro longajn paŭzojn, ĉar intertempe la tavolo de la glacio ankoraŭ pli dikigias.

Lertaj ŝipestroj de glacirompantoj provas trovi "fendetojn" en la glacia tavolo, ĉar eĉ la plej eta fendo faciligas la laboron. Ankaŭ ni, esperantistoj, serĉu fendetojn... , kiuj helpas nin rompi la kontraŭstaron de la publiko. La ŝipestroj uzas lornojn por pli facile trovi la fendojn de la glacia surfaco. Ni esperantistoj devas ankaŭ utiligi tiajn lornojn, sed mi nun nomas ilin "informado". Per vigla agado ni faru provojn trovi novajn glacirompantojn, kiuj kune kun ni dediĉas sin al la laboro rompi la glacien de la lingva maro!

En nia laboro ni ofte renkontas multan stultecon. Jes, ne forestas "saĝuloj", kiuj rekomendas al ni uzi nian aktivecon al io pli valora ol esperanto, sed ĉu ni pro tiaj konsiloj lasu la laboron?

Ne, ni ne aŭskultu al tiaj konsilantoj, ĉar multaj el niaj "atakantoj" mem estas konsciaj pri tio, ke la esperantistoj suriris la ĝustan vojon por solvi la mondlingvan demandon. Pro diversaj "motivoj" ili tamen emos malkuraĝigi nin. Sed ili ne sukcesos, ĉar kvankam la esperanta movado ne disponas je sufiĉa kapitalo por konkurenci en la anonckampanjoj por popularigi iun el la naciaj lingvoj, ni tamen disponas je alia kapitalo, kiun oni envas al ni! Jes, mi nun pensas pri la stabo de entuziasmuloj, kiuj ĉiam pretas labori pri esperanto. Tiuj personoj ne demandas unue: "Kiom oni pagas por la laboro?" Sed ili eĉ oferas monon kaj tempon por konduki la lingvon al la pozicio, kiun ĝi meritas!

Veraĵ esperantistoj estas kompensitaj, se ili povas noti "venketon". Mi ne scias, ĉu iu aŭ iuj legas la "saĝajn" vortojn, kiujn mi de tempo al tempo prezentas al vi per "La Espero", sed se tiel estas, mi nun demandas vin, ĉu vi mem apartenas al tiu kategorio de homoj, kiuj pro idealistaj motivoj aliĝis al la esperanta movado. Tion mi esperas, tial mi ankaŭ emas instigi vin daŭrigi la "glacirompadon"!


En la studsezono 1952/53 mi havis la ĝojon bonven-saluti novan stabon da kunlaborantoj en la lokoj: Bengtsfors, Berga, Bromölla, Degerfors, Hornsberg, Järnboås, Klacka-Lerberg, Leksberg, Oaxen, Sandviken, Svenljunga, Södertälje, Valskog, Villingsberg, Öskeviksby, kaj mi ne forgesas la lokojn Strängnäs kaj Svängsta, kie ni nun ricevis du modele kaj vigle laborantajn klubojn.

La demando nun estas, ĉu tiu listo fariĝos ankoraŭ pli granda en la studsezono 1953/54. La respondo donos vi kaj mi, ĉar la sukceso de esperanto kuŝas en niaj propraj manoj. Se vi ankoraŭ ne startis iun studrondon, vi memoru, ke daŭre ne estas tro malfrue starigi kursojn nek en via hejmloko nek en najbaraj.

(E. Hult)

(daŭrigo de p. 97)

ciado en la movado. Apenaŭ aperis la sciigoj pri tiu ĉi distingo, eksonis kanonado de la malvarna milito kaj la celo de la kanonpafoj estis tiun fojon Teo Jung. Nu, tia estas la vivo, tion ni scias, kaj scias tion ankaŭ Teo



Novelektita ano de
Akademio de Esperanto

Jung, kies aktivan, persistan kaj utilan laboremon ne povas perturbi la malfacilaĵoj.

Ni faras kelke da demandoj al la ĉefredaktoro kaj eldonisto de Heroldo.

Kiam kaj kiel vi kontaktiĝis kun la lingvo, kaj kiel vi komencis viajn gazetan entreprenon?

En 1905 aŭ 1906 iu lerneja kamarado en la urba gimnazio de Bonn montris al ni agendon, t.e. "porlernantan almanakon", kiu enhavis lecionon pri Esperanto, kun rakonteto. Tio estis mia unua kontakto kun Esperanto. Se tiam estus organizita Esperanto-kurso, verŝajne mi estus partopreninta. Tamen mia intereso por "artefarita" lingvo estis vekita, kaj ĝi kreskis kun la tempo tiom, ke mi mem komencis ellabori "mondlingvon". Kiam, fine de 1910, mi trovis en revuo por presejoj informon, ke por kelkaj pfenigoj oni povas ricevi lernolibron de Esperanto, mi ĝin venigis. Kvankam ĝi estis tre malbona eldonaĵo — nur eta kajero presita eĉ per frakturaj literoj! —, ĝi instigis mian intereson por la Zamenhofa lingvo ĝis tiu grado, ke mi mendis pli ampleksan lernolibron kaj vortareton kaj serioze eklernis la lingvon aŭtodidakte.

Pro tio, ke mia patro posedis presejon, jam baldaŭ mi ekhavis la ideon eldoni grandformatan kaj ofte aperantan gazeton en Esperanto; sed pro la milito 1914—18 mi povis efektiviĝi ĝin ne pli frue ol en 1920. La komenco estis tre malfacila; sed mi persistis, kaj jam kelkajn jarojn poste "Heroldo de Esperanto" estis la plej respektata gazeto esperantista.

Kiaj principoj gvidas vin lingve kaj kiaj kiel redaktoron?

Mi klopodas apliki en "Heroldo" lingvon kiel eble plej korektan kaj samtempe kiel eble plej klaran kaj kompreneblan por la legantoj.

La enhavon de la gazeto mi laŭeble adaptas al ĝia celo esti heroldo de Esperanto, t.e. heroldo de la movado por internacia lingvo. Do, informoj pri ĉio grava, kio okazas en la mondlingva movado kaj pri nia lingvo, kaj konformaj artikoloj formas la ĉefan enhavon; krome mi klopodas doni ankaŭ legaĵon literaturan, instruan aŭ distran, laŭ la disponebla spaco kiu, bedaŭrinde, en la nunaj cirkonstancoj povas esti nur limigita.

Kio estis via plej bela travivaĵo dum via esperantista kariero?

La plej ĝojiga travivaĵo dum mia esperantista vivo estis mia unua vizito al Universala Kongreso, nome al la Universala Kongreso en Praha 1921, kaj precipe la ĉeesto ĉe ĝia Solena Malferma Kunsido, kiam potence kaj majeste eksonis la melodio de "La Espero", kaj mi sentis min en unueco kun la pli ol du mil gekongresanoj, venintaj el ĉiuj anguloj de la terĝlobo por partopreni tiun ĉi feston de tutmonda interkompreno kaj frateco.

Nun ni tuŝas delikatan senton sed kun tiu celo, ke antaŭ la legantoj aperu Teo Jung per siaj plej karakterize homaj trajtoj. Homoj, kiujn la vivo devigas batali, devas armi sin kaj sub la armiloj kaj batalvestoj eble malmulto vidiĝas el la homo. Tial ni riskas la demandon:

Kaj via plej dolora travivaĵo?

La plej doloran travivaĵon mi spertis antaŭ tri jaroj, kiam samideano, kiun mi opiniis unu el la plej objektivaj juĝantoj homoj en nia movado, kaj mia bona amiko, vidigis kontraŭ mi strangan sintenon neatenditan. Ĝi estis rezulto de miskompreno, kaj de klaĉo pri aferoj jam dudek jarojn malnovaj; sed mia amiko — samideano nepre (ankoraŭ!) bonintenca kaj idealista — obstine rifuzis revizii sian sintenon. Tiu ĉagrena sperto estis la ĉefa kaŭzo de kolapso, kies malagrablaj sekvoj por mia sano ankoraŭ ne tute likvidiĝis.

Nia lasta demando estas direktita al la spertulo de la movado:

Kiel vi imagas la elformiĝon de la movado en la estonteco?

Estas malfacile antaŭdiri pri la evoluo, ĉar ĝi dependas de diversaj faktoroj kaj de la cirkonstancoj. Sed mi opinias, ke estus bone, se ĉiuj amikoj de la mondlingva afero — esperantistoj kaj aliprojektanoj — unuigus siajn fortojn por komune atingi la maksimumon kio en la diversmomentaj cirkonstancoj estos atingebla por la komuna afero. Ne necesas emfazi, ke precipe la esperantistaro devos agi prudente kaj unuece, kaj ke ĝi devos kuraĝe, fide kaj persiste sekvi sian vojon al la antaŭdestinita celo.

Mi uzas la okazon por peti vin ke vi bonvolu transdoni al via norda legantaro miajn korajn salutojn. La tutmonda Esperanto-movado ŝuldas multon al la sveda samideanaro, kiu en modela maniero laboras por nia komuna afero, kaj kiu donis al ni tiel eminentajn pionirojn kiel Paul Nylén, Sam Jansson, Ernfrid Malmgren, k.a. "Svenska Esperanto-Tidningen LA ESPERO" estas unu el la plej bele eldonitaj kaj plej bone redaktitaj gazetoj esperantistaj. Kun speciala plezuro mi rememoras pri la brile sukcesinta Universala Kongreso en Stokholmo 1934, kiun la sveda esperantistaro tiel bone organizis. Do, refoje: korajn salutojn al la svedaj geamikoj, kaj miajn plej bonajn dezirojn por la estonteco de la sveda Esperanto-movado!

☆

Jes, la antaŭdestinita celo! Ni scias ĉiuj, kion ni volas atingi. Sed ne ĉiam ni pripensas, kiel ni devas agi nepre por "atingi la celon en gloro". Al tiu "kielo" apartenas subteni por ni mem la klopodojn de tiuj, kiuj senlace agas kun firma rigardo al la celo. Legu do la Esperanto-gazetaron, la Esperanto-literaturon kaj ne forgesu, ke "Heroldo de Esperanto", inter niaj aliaj plej eminentaj gazetoj havas specialan taskon ĝi estas nia regula novaj-organo. Subtenu ĝin!

F. Szilágyi

Mi bone memoras, ke mia plej unua esp-a legaĵo en 1921 estis nekrologo pri Antoni Grabowski en "Esperanto Triumfonta". En ET aperis mia unua artikolo, nekrologo pri transilvania samideano, Otto Amon. ET ofte aperigis raportojn pri Rumanujo, same pri Svedlando — koncerne sukcesojn de nia movado — sur la 1-a paĝo. La subskribinto, kiu dum 32 jaroj grandparte vidis la 33-jaran laboron de Teo Jung, danke atestas pri sinofera idealismo, objektiveco, kaj senkompare klara, internacia stilo ĵurnalista, riĉe inspirita de nia Majstro.

T. M.

Korsiko

Korsiko, la unika mediteranea insulo, min ĉiam allogis kaj tuj post la Oslo-kongreso mi tien vojaĝis por ĝui ĝian belecon kaj dolĉan klimaton.

La longa vojaĝo de Oslo-fjordo ĝis Ajaccio-golfo tute ne ŝajnis al mi longa ĉar en multaj lokoj mi havas esperantoamikojn, kiuj venis al la vagonaro por saluti min kaj en Karlsruhe, Bern, Genève mi faris rapidvizitojn.

En Nizza mi restis kelkajn tagojn kaj ekskursis interalie al Monaco por rigardi la Oceanografian muzeon, kiun mi dum antaŭa Riviera restado ne havis okazon viziti. En tiu interesa muzeo troviĝas ĉio, kio sin movas en oceano, vivas kaj kreskas sur ĝia fundo. Mirindaj konkoj, koraloj, algoj, gigantaj testudoj kaj kraboj, fiŝoj de ĉiuj grandecoj kaj koloroj. Speciale mi memoras unu specon, "Tetrodon", kun naĝiloj kvazaŭ el flava silko kaj okuloj kiel bluaj turkisoj.

Per ŝipo estas seshora veturo de Nizza al Ajaccio, per aeroplano nur unu. Estas belege de supre proksimiĝi al Korsiko, vidi ĝiajn ruĝajn rokojn vertikale kruti en verdebluan, kristalklaran akvon.

Post surteriĝo sur la avidejon de Ajaccio, la pasaĝeroj per aŭtobuso veturas al la urbo. Apenaŭ ni haltis ekster la oficejo de "Air France", kiam subite estiĝas tumulto, ne de iuj "sovaĝaj" korsikanoj, sed de energiaj portistoj, kiuj interbatalas pri niaj valizoj. Fine ĉio estas en ordo kaj ni ekiras al niaj respektivaj hoteloj. Post dekminuta irado ni atingas longan fortikajan muron, supreniras malnovan ŝtuparon kaj jen sur altaĵo "Hôtel-Belvédère". Ĝi vere meritas sian nomon, ĉar pli grandiozan vidaĵon mi neniam ĝuis el iu hotelo, eĉ ne de la 10-a etaĝo en "Hotell Viking" en Oslo. Enveninte en mian ĉambron, mi malfermas la fenestrokovrilojn, kiuj estis fermitaj pro la suno. Sorĉas min belega panoramo: la brila Ajaccio-golfo, bluigantaj montoj kaj la nebulaj konturoj de foraj altaj pintoj.

En la hotela ĝardeno kreskas rozoj, lilioj, pelargonioj kaj floroj, kies nomojn mi ne konas. Bluaj vinberoj allogas inter la verdaĵoj, sed la oranĝoj ankoraŭ estas verdaj. Sub ombra arbo mi trinkas teon kaj la servisto fiere raportas, ke du svedoj loĝis en "Belvédère" dum la somero, du personoj el Uppsala.

Korsiko ne estas vojaĝcelo de multaj svedoj! !

Ajaccio, la ĉefurbo, ravas la fremdulon per siaj bela situo, pitoreska stratvivo afablaj, ĝentilaj loĝantoj. La multaj remparoj kaj fortikaj muroj atestas pri malpaca tempo pasinta kaj ŝtuparoj kondukas al la bordo kun alloga, kilometrolonga plaĝo.

Ekzistas luksaj hoteloj, restoracioj, elegantaj avenuoj, bulvaroj kaj estas amuze sidi en trotuara kafejo, studante la stimulan vivon ĉirkaŭe, la "indigenojn" kaj fremdlandanojn, kiuj preferiras, kaj la viglan trafikon de aŭtobusoj kun ĝajaj turistoj kaj ĉaroj, al kiuj estas ĵunglitaj azenoj aŭ malgrandaj korsikaj ĉevaloj.

Speciale interesas la malnova urboparto kun pitoreskaj kvartaloj, simplaj butikoj kaj svarmado de diversaj tipoj.

La plej primitivan butikon, kiun mi iam vidis, mi trovis en "Rue Fesch". Ĝia elmontra fenestro konsistis el truo en la muro kaj sur breto sin trovis du polvaj vinboteloj, kelkaj aĉaj bildkartoj, gluecaj bombonoj kaj kukoj, kiuj ŝajnis trempitaj en cindron.

Pli apetitige aspektis la grandaj panoj kaj kringoj, kiuj amase kuŝis en la etaj bakejoj kaj ekster la frukt-butikoj brilis altaj piramidoj de dolĉaj fruktoj. Persikoj, figoj, prunoj estis sufiĉe malkaraj sed oranĝoj kaj bananoj pli multekostaj ol en Svedlando.

Tie kaj ĉi tie ĉe la stratoj troviĝas putoj, kien la loĝantoj iras por ĉerpi akvon kaj mi vidis virinojn porti la plenigitajn kruĉojn sur la kapo.

Estis amuze ekrigardi en la simplajn laborejojn de diversaj metiistoj. Mi speciale memoras gajan ŝuiston, en kies ejo du muroj estis tute kovritaj per bildoj de filmaj kaj sportaj idoloj.

Sed la plej granda idolo de l'korsikanoj estas Napoleono kaj ĉio, ĉio memorigas pri tiu potenculo. Ajaccio estas lia naskiĝloko kaj tie troviĝas la domo, kie li naskiĝis, la kapelo, kie li estis baptita, la groto, kie li ludis kiel infano. Grandiozaj monumentoj lin gloras, bulvaroj, kajoj, placoj, hoteloj, restoracioj estas nomitaj laŭ li.

En la urbodomo sin trovas "Musée Napoléonien" kun artobjektoj kaj pentraĵoj kiuj apartenis al la familio de Bonaparte. Vizitinda estas ankaŭ "Musée Fesch", nomita laŭ kardinalo Fesch, onklo de Napoleono, kiu donacis siajn valoran artkolekton kaj ampleksan bibliotekon al la urbo Ajaccio.

En "Chapelle impériale" staras la sarkofagoj de l'gepatroj kaj fratoj de Napoleono. Li mem, kiel konate, estas entombigita en "Eglise des Invalides" en Parizo.

Cetere en ĉiu butikoj, kie turistoj aĉetas diversajn memoraĵojn, ankaŭ tie "ŝvebas la spirito" de l'granda korsikano. Lia bildo ornamas kulerojn, tranĉilojn, monujojn, pladojn, kravatojn, tukojn, vazojn kaj urnojn.

Do oni ne tro baldaŭ forgesos, ke Napoleono naskiĝis en Ajaccio!

Vigla vivo regas vespere kaj nokte sur bulvaroj kaj placoj, kie oni renkontas ne nur turistojn el diversaj partoj de l'mondo, sed ankaŭ la urbanojn kun siaj tutaj familioj, inkluzive maljunulojn kaj suĉinfanojn. Satata "rifugejo" estas "Place du Diamant" kun pompa monumento de Napoleono kaj liaj 4 fratoj kaj kun multaj kafejoj, kiujn invadas plejparte la turistoj.



Agrable estas promeni ĉe la bordo sub mistere surantaj palmoj, dum luno sorĉe brilas sur la golfo kaj ŝipoj venas kaj foriras. De Ajaccio oni aranĝas diversajn ekskursojn per ŝipo kaj aŭtobuso. Ĉarma estas la ŝipveturo al "Piana" kaj "Les Calanques", kies golfoj

Översättningstävlan

Vi börjar i detta nummer en liten översättningstävlan. Det gäller att till verkligt god och korrekt esperanto översätta en kort mening. Vi vänder oss inte till nybörjare utan i första hand till försigkomna, duktiga esperantister. Några finare pris kan vi inte utlova, utan den som sänt in den enligt vår mening bästa översättningen får ett hedersnämmande i tidningen. Förlagsföreningen har dock lovat att dessutom bidra med ett litet bokpris.

Förslagen bör vara red. tillhanda före innevarande månads utgång. Resultatet tillkännages i januarinumret. I decembernumret kommer en ny nöt att knäcka. Och så kan vi ge oss i kast med följande till synes enkla lilla mening ur en tidningsartikel om S:t Eriksmässan:

Bestämmelserna har tillkommit för att hindra att mässan får karaktär av marknad.

Rogo

estas konataj pro siaj mirindaj kolornuancoj. Forte impresas ankaŭ la vizito en "Les Iles des Sanguinaires", tiuj danĝeraj insuloj, pro kies rokoj kaj ŝeroj multaj ŝipoj pereis. Sur unu el la insuloj staras lumturo, pri kiu Alphonse Daudet rakontas en novelo en "Lettres de mon Moulin".

Ne estas permesite supreniri en la turon, sed eble mia persista peto tuŝis la koron de l'gardisto aŭ eble la informo, ke mi loĝas en la lando de blankaj ursoj, ĉar fakto estas, ke oni fine enlasis min (kondiĉe, ke mi al neniuj rakontu pri tio). — Feliĉa mi suprengrimis en la turon, de kies pinto mi ĝuis neforgeseblan vidaĵon de Mediteraneo.

Veturi per aŭtobuso sur mallargaj, kurbaĵaj korsikaj vojoj ŝajnas tre riska entrepreno, sed la korsikaj ŝoforoj, same kiel iliaj norvegaj kolegoj, estas treege lertaj.

Oni ekskursas en ĉiujn direktojn, al Bastia, la iama ĉefurbo, en nordo, al Bonifacio en sudo, tiu urbo, kiun oni konsideras plej unika en la tuta Eŭropo. Ĝi situas altsupre sur kalkŝtona roko, havas malnovan citadelon, interesajn preĝejojn kaj loĝantaron de ĝenova origino.

Granda parto de Korsiko estas kovrita de densaj arbaroj, el pinoj, korkokverkoj, olivarboj, juglandujoj. En la odorantaj pinarbaroj troviĝas la multaj sanatorioj de l'insulo.

Fama estas "le maquis", la korsika densarbetaro, kiu konsistas el bukso, laŭro, mirto, junipero, kaprifolio kaj multaj aliaj specoj kaj pensante pri ĝi Napoleono iam diris en S:ta Helena: "Kun fermitaj okuloj mi povus rekoni Korsikon ĝuste laŭ ĝiaj dolĉaj odoroj".

La lastan vesperon en Ajaccio mi vagis en ĝiaj belaj montecaj ĉirkaŭaĵoj. Mi kolektis figojn, blankajn kaj bluenigrajn, kaj ĝuis la panoramon de subiranta suno. Sangoruĝa ĝi flamis, la trunkoj de l'olivarboj brilis kiel arĝento kaj la montoj ŝajnis envolvitaj en viola veluro.

Gigantaj kaktoj postenis ĉe la vojo, aliaj kaktaj specoj kovris la krutajn rokmurojn kaj ĝiaj flavaj fruktoj grapole pendis super fendoj kaj faŭkoj.

Subite mi venis al bloko de ŝtono kaj groto, ĝuste tiu loko, kie Napoleono ludis kiel infano. Sur montplataĵo tuj proksime sin levas grandioza monumento, starigita de la urbo Ajaccio memore de ĝia granda filo. En kolsa granita tabulo estas ĉizitaj la multaj nomoj de liaj brilaj venkoj kaj sur alta soklo staras li mem, rigardante sur la urbon kaj la golfon.

Impona, potenca li tie staras, fiera pri siaj brilaj venkoj — sed eble ankoraŭ pli fiera pri sia bela hejmurbo sur paradiza insulo en Mediteraneo.

Ella Nilson



Medlems- avgifter

Medlemsavgiften till UEA för nästkommande år skall betalas nu. Årsbokens och tidningen Esperantos upplaga för Sverige måste bestämmas.

Alla avgifter till UEA skall hädanefter erläggas till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, postgiro 2012. SEF har som bekant — i likhet med många andra förbund — inträtt som Peranto de UEA. Avgifterna:

MJ — Membro kun jarlibro kr. 5: 50
MA — Membro kun jarlibro kaj la gazeto Esperanto kr. 14: 50
MS — Membro-Subtenanto med samma för-måner som MA kr. 20: —

Medlem i föreningen torde vända sig till kassören, som numera emottager avgifter till UEA. Listor har översänts till alla föreningar. Till SEF enskilt ansluten medlem insänder sin avgift direkt till postgiro 2012.

Använd bifogade inbetalningskort.

UEA måste ha direkt stöd av alla esperantister, av stort värde icke minst nu då stora avgöranden väntar. Alla svenska esperantister medlemmar i UEA!



Världsinsamlingen för Montevideo.

Sänd Edert bidrag till postgirokonto 14 74 29 (Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Malmö).

GÖR DET I DAG!

EXAMENSDAG 28 FEBRUARI 1954

Kvindeko da esperantistoj el la gubernio Skaraborg kolektiĝis en Falköping la 27-an de septembro.

La prezidanto de la Skaraborga distrikto, Tage Sjöholm, Skara, bonvensalutis.

Oskar Svantesson, Göteborg, rakontis pri peresperanta intersanĝo de instruaj bildoj inter diverslandaj lernejoj, kaj montris belan serion de kolorbildoj, kiun li tiucele faris.

La kunveno decidis, ke la distrikta estraro provu igi ĉiujn gazetojn en la gubernio akcepti por publikigado la novan esperantan gazetkurson.

La distrikta studgvidanto, John Widén, Lidköping, speciale akcentis la necescon ligi tiujn, kiuj jam komencis lerni nian lingvon, al la esperantomovado. Tiu-cele la klubaj estraroj zorgu pri tio, ke la programoj dum la klubkunvenoj estu interesaj kaj oni ankaŭ provu doni al kiom eble plej multaj el la membroj apartajn taskojn. Dum la posta diskutado oni interkonsentis pri tio, ke kreado de amika, kamarada sento en la studrondoj estas tre grava por la sukceso de la laboro.

Pri la amuza parto zorgis la falköpinganoj per "Mia frato kaj mi" — la ĝemelaj aktoroj — kaj muziko de arĉinstrumenta kvarteto. La prezidanto de la esperantoklubo de Falköping, Harry Carlsson, transdonis al sinjorino Gerda Eriksson — la libron "La Normandaj Rakontoj" kaj florbukedon danke pro ŝia sindona laboro en la klubo.

obo



"Por distraĵaj horoj..."

ne troviĝas io pli bona ol studmaterialo "Esperanta Studservo". Specimenan jarkolekton de "ES" sendos al vi E. Hult, Boställsvägen 9, Arvika, se vi sendos 2: 50 al lia poŝtgira konto 32 49 36.

Esperanto A-paktsspråk, förslag i Paris

TT-AFP. Två deputerade, Lefrance och Billeres, motionerar i nationalförsamlingen om att regeringen skall uppmanas göra esperanto till ett hjälpspråk för offentliga dokument. De föreslår också esperanto som det gemensamma språket för Atlantpaktorganisationen och Europarådets rådgivande församling.

Esperanto en RADIO

Mez-Eŭropa tempo

Mallongigoj: 1 = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Lunde	22.35—22.40	Wien. 513 m, 48,74 m, 25,46 m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Marde	12.55—13.00	Bern. 48,66 m, 31,46 m, 16,87 m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwe- lendienst, Neuengasse 23, Bern.
	16.00—16.15	Wien. 203 m, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m. P. (ĉiun duan mardon).
	18.35—18.40	Bern. 48,66 m, 31,46 m, 19,60 m. P. D-ro Baur.
Merkrede	16.45—17.00	Graz. 417,2 m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭ- strujo.
	19.00—19.20	Roma. 25,21 m, 31,35 m, 49,92 m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	20.30—21.00	Madrid. 225 m, 42,33 m. P. Ra- dio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, His- panujo.
	22.45—23.15	Valencia. 43 m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, His- panujo.
	23.15—23.20	Hilversum. 298 m, 188 m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hil- versum, Nederlando.
Ĵaŭde	08.40—08.45	Lille. 218 m. I. Prof. Labit. 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	09.30—09.45	Paris. 348 m. K. Esperanto- Office, Orléans (Loiret), Fran- cujo.
	12.55—13.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Pri- vat.
	18.35—18.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Pri- vat.
	00.05—00.30	Zagreb. 264,7 m. I. Radio-Za- greb, Jugoslavujo.
Vendrede	19.00—19.20	Roma. Kiel merkrede.
	23.15—23.30	Hilversum. 402 m. P. (nur unu fojon ĉiunonate). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabate	09.30—10.00	Rio de Janeiro. 375 m, 30,71 m. K. I. Radio Ministério da Edu- cação, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	23.15—23.20	Hilversum. 402 m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

M. Beraru:

En nia lando

... En nia land' fiere kreskas
Abioj, kverkoj, fagoj;
En nia land', fanfaronuloj,
Parolas nur pri... agoj.

... En nia land' abunde kreskas
Karotoj kaj rafanoj;
En nia lando, nur babilas
La gesamideanoj.

... En nia land', plej belaj kreskas
Kukurboj kaj kukumoj;
En nia land', malofte sekvas
Promesojn la plenumoj.

... En nia lando floras rozoj,
Violoj kaj dianoj;
En nia lando, nur titole
Ekzistas grupgvidantoj.

... En nia land' abunde fluas
Biero, vino, brando;
En nia land', nenion preskaŭ,
Efikas propagando.

Mi repesis ĉi poemon de mia iama samlandano, kiun li verkis en Rumanujo. Ni esperas, ke la prikantitaj cirkonstancoj aktualas nek en Svedujo, nek en iu alia lando. Aŭ eble tamen? ... Ni fosu nian sulkon!

T. M.

Bondezirojn por Kristfestoj kaj Novjaro

vi sendas al viaj en- kaj eksterlandaj geamikoj per niaj multkoloraj kartoj kun esp. teksto.

10 div. kartoj kr. 1:75



BOKLOTTERI

är ett uppslag till programpunkt lika lämpligt att anordna när som helst men i synnerhet i samband med BOKENS DAG i december.

Vi har färdiga vinstsatser bestående av esperantoböcker för sammanlagt kr. 30:— uppdelat på 3 vinster till ca 15:—, 10:— och 5:— kr värde.

2 satser lotter för amerikanskt lotteri (numrade 1—99) samt anteckningslista (+ ett tröstpris) bifogas varje sats gratis. Fraktfri leverans.

Lottförsäljningen inbringar som bekant kr. 49:50 och Eder nettobehållning blir alltså kr. 19:50.

Allt är sålunda klart att sätta igång: Din förening får en ny programpunkt, en nätt extraförtjänst, bidrar till ökad spridning av esperantolitteraturen och sist men inte minst viktigt, behöver inte betala den erhållna vinstsatsen förrän lotterna sålts!



Förlagsföreningen
ESPERANTO
Postgiro 578
Box 19071. Stockholm 19


Om sammansatta verbformer

Esperantos verbböjning har vissa drag, som är främmande för svenska språkvanor. Det är bäst att veta detta i förväg och vara inställd på att möta någonting nytt, någonting som kan se svårt ut men i själva verket inte är det.

Tänk Er till att börja med in i följande: (kiu som)
 leginto = leginta homo = homo kiu legis, homo kiu estas leginta
 leganto = leganta homo = homo kiu legas, homo kiu estas leganta
 legonto = legonta homo = homo kiu legos, homo kiu estas legonta

Vi lär oss ESPERANTO

Lektion 4



Trinkonto (Li trinkos akvon = li estas trinkonta akvon)
 Trinkanto (Li trinkas akvon = li estas trinkanta akvon)
 Trinkinto (Li trinkis akvon = li estas trinkinta akvon)

Passiv form:
 La akvo estas trinkota La akvo estas trinkata La akvo estas trinkita
 Vattnet skall drickas Vattnet drickes Vattnet har druckits
 (= vattnet är druckett)

	estis	estas	estos
leginta	hade läst*	har läst*	skall ha läst
leganta	läste	läser	skall läsa
legonta	skulle läsa	skall läsa	skall läsa (framtidens framtid)
legita	hade lästs (= var läst)*	har lästs (= är läst)*	skall ha lästs (skall vara läst)
legata	lästes (= blev läst)*	läses (blir läst)*	skall läsas (skall bli läst)*
legota	skulle läsas	skall läsas	skall läsas (framtidens framtid)

Uppbyggnaden av verbsystemet är logisk och ger rikare uttrycksmöjligheter än t. ex. svenskans verbsystem. Men i aktiva former klarar man sig så gott som alltid med de enkla formerna (**trinkis, trinkas, trinkos**). Fundera därför inte just nu för mycket på de här sakerna, som vi har tagit med därför att Ni inte skall stå alldeles främmande inför dem! Vi har också utmärkt oftast förekommande former med en stjärna. När Ni har tittat litet på dessa sammansatta former, kan Ni glädja Er över, att Ni mött det, som en svensk ofta anser som det knepigaste i esperantos grammatik!

16. Alla sammansatta verbformer (verbformer, där huvud verbet är förbundet med ett hjälpverb) bildas med **esti** + något av de sex participen **-int, -ant, -ont** (i aktivum), **-it, -at, -ot** (i passivum).



"Bonan tagon, kiel progresas la negocoj?"

tago dag, **progesi** göra framsteg, **negoco** affär (sverksamhet).

(Regler:

15. Esperanto har endast ett hjälpverb, nämligen **esti**. **Havi** kan aldrig användas som hjälpverb — det betyder alltid ha = äga.

Angla diplomato estis invitita al Hungarujo de la hungara registaro por diskuti ekonomiajn problemojn. En la unua vespero post lia alveno oni aranĝis je lia honoro grandan festmangon. Hungara diplomato leviĝis kaj faris longan paroladon en angla lingvo. La angla diplomato post iom da tempo flustris en la orelo de akompananto, kiu sidis apud li: "Strange! La hungara lingvo devas esti facile lernebla. Mi ja komprenas multajn vortojn!"

angla engelsk, **diplomato** diplomat, **inviti** inbjuda, **estis invitita** var inbjuden (hade inbjudits), **Hungarujo** Ungern, **hungara** ungersk, **regi** regera, **reg-ist-aro** regering, **por** för, **här = för att**, **unua** första, **vespero** kväll, **post** efter, **lia** hans, **al-veno** ankomst, **aranĝi** arrangera, **je** här = till, **honoro** ära, **granda** stor, **festmango** festmåltid, **lev-igi** resa sig, **levi** lyfta, **parol-ado** tal, **post iom da tempo** efter någon tid, efter en stund, **flustri** viska, **orelo** öra, **akompani** följa, **ledsaga**, **akompananto** följeslagare, **sidi** sitta, **apud** bredvid, **stranga** besynnerlig, **facila** lätt, **kompreni** förstå, **multaj** många.

Affix: **isto**, som sysselsätter sig med: **instruisto**, lärare, **ŝuisto** skomakare (ŝuo sko) **aro**, samling, skara: **arbo** träd, **arbaro** skog, **ad**, varaktighet eller upprepning: **paroli** tala, **parolado** tal, **signalo** signal, **signal-ado** signalering.

☆ tjugofemöre **0:25** tjugofemöre ☆

kostar

NYCKEL TILL ESPERANTO

230 000 ex. har tryckts i Sverige med den 17:e upplagan, som nu är klar för utsändning till klubbarna.

Sälj eller skänk

en NYCKEL till intresserade, vänner och andra, som är i behov av upplysning.

Deltag i NYCKELTÄVLAN

(Regler på sid. 71 i juni-julinumret av La Espero.)

Förlagsföreningen Esperanto

Fack 19071 - Stockholm 19

☆ tjugofemöre **0:25** tjugofemöre ☆



39-a Universala Kongreso de Esperanto

HAARLEM, 31.VII—7.VIII.1954

Adreso: POŬTFAKO 140, Haarlem, Nederlando
Banko: Rotterdamsche Bank, Haarlem
Banka poŝtĝirkonto: n-ro 8238

ANMÄLNINGAR

till kongresen verkställes av var och en särskilt. Ifyll och insänd anmälningsblankett och översänd kongressavgiften via affärsbank, som hjälper Er att ordna den detaljen. Kongressens bankförbindelse är: Rotterdamsche Bank, Haarlem.

KONGRESSAVGIFTER intill 31/12	31/3	30/6
Kongressmedlem Guld. 19:—	22:—	25:—
(sv. kr. c:a 25:—	30:—	35:—)
Make eller maka till d:o Guld. 9:50	11:—	12:50
(sv. kr. c:a 12:50	15:—	17:50)
Ungdomar högst 20 år Guld. 6:50	7:50	8:50
(sv. kr. c:a 9:—	10:—	12:—)

Nova denaska esperantisto

Filo naskiĝis al Rut kaj Erik Carlén, Hällabrottet, la 23-an de oktobro 1953.

Stipendium

för deltagande i esperantovärldskongresen i Haarlem.

Tack vare en gåva från Sällskapet Humanitet är Svenska Esperantoförbundet i tillfälle utdela

2 st. stipendier å vardera 250 kr.

för deltagande i 1954 års esperantovärldskongress. Sökande skall icke vara över 18 år.

Ansökan ställes till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, och insändes senast den 30 mars 1954. Ansökningsblankett kan rekvideras från SEF. Meddelande om vem som erhållit stipendierna utsändes från Stockholm den 1 juni 1954.

REMINGTON Junior-Riter **449:-**

Finns nu för omgående leverans med esperantotyper

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Tegelbacken, Stockholm C.

Redaktoro: T. Morariu, Götaforsvägen 1, ENSKEDE. Tel. 48 20 78.

Prezo de abono: por 1954 (12 n-roj) 6 sv. kr., duonjaro 3:50. Eksterlanda abono 7 sv. kr. aŭ 18 resp. kuponoj. Unuopa n-ro 60 öre.

Prezo de anoncoj: 1/1-paĝo 90:—, 1/2=50:—, 1/4=30:—, 1/8=15:50, 1/16=8:—, 25 öre por mm. Kore-spondaj anoncetoj: 25 vortoj=2:—, 50 vortoj=4:—.

Sveda Esperanto-Federacio (Svenska Esperanto-Förbundet).

Adreso Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Poŝtgiro 20 12. La oficejo estas malfermita lunde kaj ĵaŭde 19h-21h. Priv. tel. de la sekr. Harry Törnskog 47 32 88. Kotizoj por izolaj membroj 1954: 12 kr., junuloj 5 kr., familia membro sen gazeto 5 kr resp. 2 kr.

Sveda Esperanto-Instituto. Yngve Nilson, Förvaltarvägen 20, Enskede. Tel. 94 19 59. Poŝtgiro 515 11.



Manuskriptoj por certa numero atingu la redaktoron plej malfrue la 10-an de la antaŭa monato.

Uzu ĉiam skribmaŝinon. Lasu larĝan margenon. Sendu la unuan originalon (ne la 4-an kopion).

MOPEDLITTERI

Skåneesperantisternas Lotteri har startat

med försäljning inom Malmöhus län.

Högsta vinsten är 1 st. moped "Maraton", och bland de 20 övriga vinsterna märks golvlampa, stickfåtölj, soffbord i mahogny och moderna hushållsartiklar.

GRATIS FLYGRESA MALMÖ—KÖPENHAMN RETUR FÖR 1 PERSON eller **GRATIS FLYGRESA MALMÖ—KÖPENHAMN** samt återresa med båt för 2 personer eller **SVENSKT PRESENTKORT TILL ETT VÄRDE AV KR. 25:—** erhåller den esperantist, som säljer de flesta lottsedlarna.

Dragning äger rum den 4 december 1953.

Rekvision av lottsedlarna, som tillhandahållas i häften om 25 st. à kr. 1:—, kan göras inom länet antingen genom resp. klubbstyrelser eller genom fröken Gulli Svensson, Skansgatan 1, Malmö, tel. 150 70.

SKANES DISTRIKT AV SEF
Distriktsstyrelsen

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet

Bilaga medföljer

